



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

P. BABIN

Le Haut des Bourrellières

17, rue Romain-Rolland

85100 Le Château-d'Olonne

P.C.K Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1993 — 4

(OKTOBRO-NOVEMBRO-DECEMBRO)

Jarabono : 70 fkoj

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... ina vivosorto dum la Mezepoko ...



... Kaj megalitoj en Korsikio

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine-VINCENT

26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatanoj :

Pierre Babin

Simone Guillot

ENHAVO

paĝo

El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (Frangaul)	2
Megalitoj en Korsikio	3-4
Baghy, la arlekeno de la vivo	5-6
(F. Boyet)	
Pri ina vivosorto (S. Boniol)	7-9
La monstro de Loch-Ness (Golden)	10-11
Pri Kristnasko	12
Moderna fabelo (F. Szilágyi)	13
Por via distro	14
La vivo en Gresillon	15-16

El Gresillon

La jaro 1993 estis, por la Esperanto-Domo, nur mezŝukcesa. La nombro da ĉeestantoj ne multe malkreskis sed la daŭro de la ĉeestoj mallongigis. Kia estos 1994? Kompren-eble demando nun senrespon-da. Sed la printempo anonciĝas sub favora aŭspicio. Espereble la Infan-Renkonto estos, en 1994, same ŝukcesa, kiel en 1993. Kaj, grava evento estas, ke la 49-a Kongreso de SAT-Amikaro okazos en Gresillon de la 1-a ĝis la 4-a de aprilo venonta. Dum interparolado kun respondeculoj de la Organiza Kongresa Komitato, la reprezentantoj de Gresillon montris la gastigad-eblecojn de la kastelo, ne sufiĉajn, por la akceptado de tiom da kongresanoj, kiom kutime aliĝas. Pliaj ĉambroj haveblas ankaŭ en ne malproksima hotelo, kaj la urbestrano de St Martin d'Arcé, tre proksima vilaĝo, disponigos grandan salanon al la OKK dum la

kongrestagoj. Do, kontrakto estis farita inter la gastigontoj kaj la Kongresa Komitato. Plenplena certe estos la kastelo komence de aprilo 1994.

NI FUNEBRAS

Ĉiuj el vi, kiuj almenaŭ unufoje vizitis Gresillon, de ĝia fondiĝo ĝis 1966, tre certe memoras pri la "familio Thébaud", kiu efike partoprenis en la vivo de la Esperanto-Domo dum la pioniraj jaroj. Paule, la edzino de Frédéric, forpasis en novembro, en Guérande, kie ili vivis post sia emeritiĝo. Ni partoprenas en la ĉagreno de Frédéric kaj prezentas al Joel, Luc kaj iliaj familioj niajn plej amikajn kondolencojn.

Ankaŭ Larbi Braïk mortis antaŭ nelonge. La geamikoj, kiuj renkontis lin memoras pri afabla homo, valora esperantisto. Ni kondolencas lian familion.

Esperanto tra la Mondo



KELKAJ KONGRESOJ EN 1994-

Universala kongreso de UEA en Seulo (Koreio) de la 23-a ĝis la 30-a de julio.

Internacia Junulara Kongreso en Chonan (Koreio).

Kongreso de SAT en Straznice (Ĉeĥio).

Kongreso de IFEF en Krems/Donau (Aŭstrio).

Kongreso de SAT-Amikaro en la Kultur-Domo Grésillon, Baugé (49500).

Kongreso de UFE en Agde-Sète, apud la mediteranea marbordo.

LA ESPERANTA P.E.N.-CENTRO-

La Esperanta P.E.N.-Centro estis akceptita sine de la tutmona P.E.N.-klubo. Tiu organizo kunigas la plej famajn verkistojn en la tuta mondo.

EN LA EŬROPA PARLAMENTO- Konferenco, organizita de la Fondaĵo Hanns Seidel de la germana partio CSU, kunlabore kun Eŭropa esperanto-Centro okazis en Bruselo. La temo estis: "La komunika kaj lingva problemoj en la Eŭropa Komunumo; kiugrade planlingvo povus kontribui al ĝia solvo?". Pli longa seminario estas planata por la venonta jaro.

EN LA "EŬROPA" ARMEO- Jam ekzistas embrio de eŭropa armeo kun germanaj kaj francaj soldatoj; la franca kaj la germana lingvoj estas la du oficialaj lingvoj. Lastatempe aldoniĝis belgaj soldatoj, kaj la belga ministro postulas, ke estu aldonita ankaŭ la nederlanda-flandra lingvo. Kio okazus se Britio, Italio, Hispanio...partoprenus?

EN IRANO- En la irana Nacia Universitato Beĥestī, d-ro Saheb-Zamani gvidis esperanto-kursojn por profesoroj kaj studentoj. Komenciĝis ankaŭ kursoj en la fakultato pri literaturo. Prof d-ro Hosejn Namazi, eks-ministro pri financo kaj ekonomio faris deklarojn pri la graveco de esperanto, ankaŭ laŭ la ekonomia vidpunkto por la studentoj kaj la landoj de la Tria Mondo.

EN ORIENTA FRANCI- Juna industriisto de Alzaco kreis Tutmondan Asocion de Konstruistoj Esperantistaj (TAKE), kies gazeto estas "(La Domo Jarcento 21" Pronumero ĉe: Bruno Schmitt, TAKE, RN 83, rue de Tiefenbach, 68920-Wintzenheim-Colmar. Ankaŭ aperis turisman informilon pri Alzaco: Centre de Mittelwhir, 16, rue de Bouxhof, 68380 Mittelwhir.

NOVAJ ELDONAĴOJ -

- "Rakontoj pri Sarajeva sieĝo", milita taglibro de bosnia ĵurnalistoj, tradukita de F. Lo Jacomo.

- "Le Plessis-Bourré kaj Alĥemio", dulingva (franca kaj esperanta lingvoj), verkita de A. Cherpillod. 40-paĝa libreto pri "neordinara kastelo", kiu troviĝas apud la Esperanto-Domo Grésillon.

- "La herbo de la virgulino", novelaro skribita de Jakez Riou, tradukita el la bretona lingvo de F. Le Magadure

- "Ibere, libere" komuna poezia volumo de kvar junaj aŭtoroj el la "ibera skolo", Gonçalo Neves, Fernando Kamaço, Liven Dek, Miguel Fernandez.

- "Cent jaroj de soleco", traduko de la fama verko de la sud-amerikano Gabriel Garcia Marquez, fare de Fernando de Diego, kiu tradukis ankaŭ la ĵusaperintan "Tirano Banderas".

- "Teorio kaj praktiko de lingvo-instruado", altnivela verko de Irina Szanser.

- "La korpo de la homo. Enkonduko al konstruo kaj funkcio" de Harald Schicke (populara anatomio).

- "BIOLOGIA Krestomatio" (25 fakaj studoj), de paleontologio ĝis bestkuracado.

- "Sferoj n°8". Sekvo de jam konata sciencfikcia antologio kolektiva. Tiufoje temas pri originalaj rakontoj.

MEGALITOJ EN KORSIKIO


Por kompreni Korsikion kaj la Korsikojn estas necese memori, ke tiu insulo estas nur 180 km. longa kaj 80 km. larĝa. Ĝi estas la malplej loĝata el la mediteraneaj insuloj. Guy de Maupassant skribis: "Korsikio estas vera montaro en la maro". La unuaj enloĝantoj vivis en la montaroj kaj la sinsekvaj invadantoj forpelis la antaŭajn alvenintojn pli alten, al valoj malfacile atingeblaj.

Neniu spuro de paleolitikaj homoj ekzistas. Sed multaj estis trovitaj de la neolitika civilizo. La tiamuloj ŝirmis sin sub rokoj. Ankoraŭ pli multaj estas la atestaĵoj, eĉ monumentoj, de la megalita periodo. Oni povas konsideri tri subperiodojn. Unue ĝis 1500 jaroj antaŭ Kristo oni faris kofrojn por la mortintoj kaj starigis dolmenojn kaj menhirojn, unu- aŭ pluropajn. Poste, la menhiroj fariĝas, iom post iom, specoj de statuoj homformaj. Tiuj statuoj prezentis mortigitajn malamikojn. Multaj dolmenoj kaj menhiroj ekzistas sur la insulo, ĉefe la vicaro de Cauria kaj tiu de Palagiu apud Sartene. Dum la tria epoko (1500 ĝis 1000 j. antaŭ K.) estis konstruitaj grandaj volbaj monumentoj kun ĉambroj aŭ galerioj. Oni nomas ilin "torri" (turoj). La plej belaj postrestantaj monumentoj de la "torea" civilizo troviĝas en la sudo de la insulo, en Cucuruzzu, Araggio kaj Filitosa. En tiu lasta loko la arkeologoj trovis spurojn sinsekvajn de diversaj epokoj de la korsikia prahistorio.

Filitosa estas vere la ĉefa religia kaj arta centro de prahistoria Korsikio. Ĝi situas sur roka pinto planita kiel fortreso (opidumo) superstaranta la kunfluejon de du riveretoj. La tutan regionon, malaltan valon de la rivero Taravo, punktas multaj megalitoj. Filitosa, malkovrita en 1954, sintezas la diversajn epokojn de la korsikia prahistorio. Tie, jam 6000 jarojn

antaŭ Kristo, vivis homoj, kiuj vivtenis sin per ĉasado, fiŝkaptado kaj plukado. Ili utiligis ŝtonojn pintigitajn, kiel armilojn. Ili loĝis en kavaj ŝtonegoj aŭ sin ŝirmis sub rokoj. Ili poste fariĝis malnomadaj kaj tiam konstruis kabanojn supre de montetoj. Ili transmigris de la marbordaj ebenaĵoj, kie ili vivis vintre, al la montaro, somere. Ili scipovis teksu kaj fabrikii potojn.

Ĉirkaŭ la jaro 3000 a.K. la megalita religio disvastiĝis en la sudokcidenta parto de la insulo.



Tiam oni metis la mortintojn en pli malpli enterigitajn kofrojn el ŝtono, sub dolmenoj. Proksime al tiuj tombejoj oni starigis menhirojn ĝis 4 metroj altajn. Eble ili entenis la spiritojn de la mortintoj. La unuaj menhir-vicoj aperis 2000 jarojn a.K. En 1800 a.K. la menhiroj fariĝis homformaj sed sen gravuraĵoj: oni distingas nur skizon de kapo kaj de ŝultroj. Iom post iom aperas la vizaĝoj kun nazo, okuloj kaj buŝo. En 1500 a.K. la menhir-statuoj

kun pli preciza anatomio, aperas, eĉ kun gravuraĵoj de armiloj. Kelkaj asertas, ke tiuj statuoj prezentas la malamikojn mortigitajn dum bataloj, ĉar, tiuepoke, suda Korsikio estis invadita de iu batalema popolo, kiu iom post iom forpelis la antaŭantojn pli alten en la montaro. Ĉu ili estis la Sardanoj, kiuj tiam timigis la mediteraneajn popolojn ĝis Egiptio? Tiuj novaj invadantoj estis teknike pli evoluintaj, kun bronz- aŭ fer-armiloj. Ili konstruis rondajn fortresojn, 6 ĝis 8 metroj altajn, kiuj verŝajne havis religian rolon kaj kiujn oni nomas, "torre". Tiu torea civilizacio (1500-1000 a.K.) kiu anstataŭas la megalitan civilizacion en suda Korsikio similas aliajn mediteraneajn civilizaciojn. Fakte la "Toreanoj" estus foririntaj al Sardinio ĉirkaŭ la jaro 1000 a.K.

La fortikaĵo de Filitosa estas tore-epoka. Sed la menir-statuoj de la megalita epoko estis parte utiligitaj por la konstruado de la fortikaĵo. La orienta monumento estas tumulo kun kunaraĝita eksteraĵo konstruita inter dikegaj rokoj. Konstruita deklivaĵo kondukas al la supro.

La centra monumento estas torea religia. Interne okazis

ofer-cindrigoj. En la muroj vidiĝas pecoj de menir-statuoj utiligitaj kiel konstru-materialo.

La okcidenta monumento, ĉe la ekstremo de la pinta roko, estas pli kompleksa. Ĝi estus konstruita de la Toreanoj post la definitiva venko super la megalitaj homoj. Ĝi verŝajne estis religia konstruaĵo, kiu eventuale utilis, kiel komuna defend-loko.

Malsuprenirinte, la vizitanto, post transiro de rivereto, atingas vastan herbejon. Apud oliv-arbo plurcentjara staras kvin menir-statuoj kun gravuritaj armiloj. La leviĝanta suno reliefigas tiujn gravuraĵojn. Revenante, la vizitanto preteriras la centran monumenton kaj malkovras la fundamentojn de torea vilaĝo. Dum la prifosado ankoraŭ daŭranta oni trovis, en la stratumaj subaj tavoloj, postrestaĵojn de la plej antikva okupado de la loko, neolitikajn ceramikaĵojn de la 5-a jarmilo a.K.

La muzeo estas nepre vizitinda. La objektoj eltrovitaj okaze de la prifosadoj estas tie prezentitaj kun klarigaj tekstoj kaj fotoj. Oni povas vidi tie tre belajn pecojn de menir-statuoj.

P.B.



BAGHY - LA ARLEKENO DE LA VIVO

Pelego de F. Boyet - 2-a parto

Verdaj Donkifotoj- En tiu verko estas unue romano: la Vivo de Paŭlo Paal, kaj poste karikaturaj portretoj de esperantistoj. Per tiu verko Baghy montras, ke li tre bone konas la "mondon de la esperantistoj", kaj ankaŭ la iluziojn, kiujn la esperantistoj renkontas.

La romano temas pri junulo, kiu lernas esperanton, aktivas en la movado; sed lia edzino deziras konservi sian edzon, kiu estas ĉiam for. Fine, Baghy imagas, ke lia rolulo vizitas lin. Kaj jen la konfeso de Paŭlo Paal kaj la konsiloj de Baghy al la junulo. "La homo estas migranto kaj antaŭ li varias la pejzaĝoj...La gepatroj vojon perdis kaj ni ankoraŭ ne trovis la novan. Tamen vi eraras se vi opinias min pesimista. Mi estas multe pli optimista ol tiuj, kiuj konstante kikerikas pri la baldaŭa tagiĝo kaj maja printempo. Mi vivis inter ili, mi batalis por iliaj ideoj kaj mi devis vidi tiun frاتمurdan luktadon, intrigon, kiujn ili faras inter si... Ne miskomprenu min! Ne la vojon mi kulpigas, sed la vojirantojn mi trovas malfortaj, subaĉeteblaj kaj tro mizeraj por konservi homan dignon en la batalo. Mi spertis, kion ili pene konstruis dum jaro, detruis dum tago. Kaj ankoraŭ io el iliaj vicoj forpelis min: mia memo mem. Multe mi studis la mondhistorion kaj mi trovis, ke la socia vivo estas kiel la komedianto, ŝanĝanta nur la kostumojn. Inter la nuraj materialismo kaj spiritualismo mankas la ponto. Nu por trovi tiun ponton mi decidis ekmigri kaj migri, tiri post mi mian ĉaron, perlabore subteni min kaj trovi internan harmonion" - Baghy aldonas: "Li ekmigru kaj fuĝu. Li estas juna, sana kaj antaŭ li viciĝas multaj mejloŝtonoj. Eble, ĉe unu li trovos sin mem. Kiel Paŭlo Paal ankaŭ mi estis iam juna migranto kaj ankaŭ mi apartenas al la vojsenanta aro de Verdaj Donkifotoj."

La teatra korbo- Krom la rakonto pri la infanaĝo, kiun mi jam raportis, estas speciala studo nomata: "Pesimismo-Optimismo". La tuta teksto entenas 14 paĝojn kaj estas malfacile resumebla. Tamen, mi provos retrovi la ĉefajn temojn.

1) Pesimismo: La mondo ne havas signifon. Ni vivas sen celo, laŭ artefarita moralo, kiu varias laŭ la epokoj. La Vivo estas taksata sankta, sed kial? Estus pli racie morti por ne plu suferi. La paradizo estas falsa logaĵo kaj la danko de posteularo estas iluzio, kaj tiu posteularo heredos de ni nur malbonajn ideologiojn, kaj speciale pri la sankteco de la Vivo. Resume ni vivas por Nenio.

2) Optimismo: Ni estas ne nur korpo sed ankaŭ animo. Dum nia korpo baraktas kaj suferas sur la tero, nia animo partoprenas en la Kreanta Vivo, kies parto ĝi estas. La celo de nia vivo estas la kreado de tiu perfekta Homo.

3) Konkludo: "Penso zigzagas tra mia kapo: ĉu efektive ni vivas? La respondo tremas en tiuj pesimistaj kaj optimistaj ĝemoj, kiuj celas nur unu: la plifaciligon de la krucoportado. Ne nur tiun de nia kruco, sed ankaŭ tiun de la via.

Kiu neniam havis pesimistan humoron, tiu neniam povos kompreni la suferon de sia homfrato. Kiu neniam havis optimistan animstaton, tiun vizitis eterna blindeco. La nekomprenemaj kaj blindaj homoj forbrulas en propra fajro sen utilo por la homa komunumo. Ili estas malkuraĝaj por ribeli eĉ kontraŭ sin mem. Mi kompatis ilin, sed helpi mi ne povas.

Tamen staru ĉi tie sincera konfeso: nur en tiuj momentoj mi estis feliĉa, kiam mi sukcesis forgesi pri mi mem kaj mi pensis pri aliaj; plej terure mi sentis la premon de malfeliĉo, kiam mi dronis en la zorgoj pri mi.

La evoluanta Homo jam venkis la aeron, maron, tempon. La evoluanta Homo venkos ankaŭ en si ĉion, kio nun malhelpas la liberan flugon de lia animo. Per kio? Per la volo karakterizanta lian originan spiriton, la Kreantan Vivon. Laŭ kiu vojo? La homo savos sin per la Homo."

Pri la filozofio de Baghy-

Estas bone memori, ke inter 1918 kaj 1920, Baghy aĝis inter 27 kaj 29 jarojn. Kiam li verkis la romanon "Viktimoj", li estis malpli ol 34-jara. En tiu periodo, se oni juĝas laŭ la rolulo Bardy, la idealo de Baghy estas tiu de iu kristana sanktulo. En la romano "Sur sanga tero", Bardy akceptas la dubojn de la komunistoj, kiujn li renkontis, sed li aldonas, ke eĉ se tiu helpo estas nur vana konsolo, ĝi tamen helpas por konservi la vivon atendante la rekonstruon de la persono, tio estas la homa homo. Pri tio li neniam variis.

La verkoj "Hura" kaj "Printempo en la Aŭtuno" aperis en 1930 kaj 1931, sed pro la dato de la antaŭparolo, oni povas diri, ke ili estas samtempaj, ili aspektas tute malsamaj, sed tamen oni renkontas la samajn du flankojn de tiu dubema filozofio. (Tiam Baghy estas proksimume 40-jara). En "Hura", krom la homoj de Strumagen, kiuj estas blinduloj (laŭ la difino, kiun li donas en "La teatra korbo"), la homoj, kiuj pripensas montras tion, kion Baghy nomos "pesimismo" kaj "optimismo" en "La teatra korbo". La kulturhomo opinias, ke la Vivo estas nur "movo por la movo"; ĝi estas tute sencela. Kontraŭe Tamara prikantas la venontan aperon de la homa homo. Inter tiuj du polusoj, diversaj homoj serĉas sian vojon. Tre verŝajne Baghy dezirus, ke Tamara pravu, sed ĉu li mem ne dubas? Oni retrovas la samajn du flankojn en "Printempo en la aŭtuno". Tie la pesimisto estas Balthazar por kiu "ĉio estas ŝajno", dum Fridolin sen teorio proponas arlekeni, kaj tuj Balthazar, same kiel Bardy (en "Sur sanga tero") teoriumas pri la neceso de iu arlekeno de la Vivo por helpi al pli facila travivado (Baghy, pro kristana influo, diras "porti

sian krucon" en "la teatra korbo"). En tiuj du verkoj, pesimismo kaj optimismo opozicias, sed dum en "Hura", la optimismo triumfas nur "ekster la homaro, sur iu utopia insulo", en la ĉiutaga vivo de la gimnaziano de "Printempo en la aŭtuno", la optimismo estas nur bandaĝo, kiu provizore sendolorigas la kruelan realecon. La printempo ne daŭras en la aŭtuno, kaj la foriro de la junulino estas ordigita kiel entombigo.

Kiam aperis "Verdaj Donkiĥotoj", Baghy estis 42-jara, li jam multe agadis en la esperantista mondo, kaj sendube multfoje seniluziiĝis. Li montras la personon Paŭlo Paal, kiu migras por serĉi sian veron. Li perdis la edzinon por Esperanto, sed pro la esperantistoj, li distanciĝis de la movado kaj li vadas. Kaj kion konsilas al li la spertulo Baghy: "Vi mem devas migri kaj serĉi, ĉar nur vi povas trovi vian veron. Kompreneble, la ĉiama idealo estas la homa homo, sed praktike, por la hezitema individuo, la unua paŝo estas trovi sin mem. Tiu konsilo ŝajnas kontraŭdira kun la konsilo, kiun li donas en la sama libro, kiam li diras, ke la sola vojo, kiu kondukas al feliĉo estas la forgeso de si, por nur pensi pri la aliaj. Sed oni povas sintezi tiujn du proponojn per la fama esprimo: "la arlekeno de la Vivo". Kiam homo pensas pri la aliaj, li arlekenas por ĝojigi ilin, kaj per tiuj helpoj donataj al la aliaj, ne necese tiel tragikaj, kiel tiuj de Siberio, pli simple laŭ la sinteno de Fridolin, la arlekeno, se li parolas, kiel parolis Balthazar, kiam li donis konsilojn al Fridolin, tiel la serĉanta homo povas pli ĝuste trovi la celon de sia vivo en la feliĉigo aŭ almenaŭ konsolo de la aliaj.

Jes ja, la kerno de la praktika sinteno de Baghy estas arlekeni por helpi al la elvolviĝo de la homaro, al la konstruo de tiu idealo: la homa homo.

Fernand BOYET

PRI INA VIVSORTO DUM MEZEPOKO KAJ RENESANCO

Meze de hereza mondo, kristanismo alportas netakseblan evoluon: ĝi ekproklamas fundamentan egalecon de ĉiuj homoj antaŭ Dio, forigante ian ajn rasan aŭ seksan apartigon. En religio surbaze de amo fundamentita, la privilegiuloj estas la humiluloj, la suferantoj kaj antaŭe subtaksatoj. Filinon oni jam ne plu rajtos mortigi postnaskes; kiam junulino propravole sin dediĉas al monaĥina vivmaniero, ŝia decido estos tute alia ol tiu de patro deviganta sian filinon al dumviva ĉasteco en templo de Vesta diino. Tia apero de ina personeco kaj memstara volo, jen gravega ŝanĝiĝo. Sed tia mesaĝo nefacile inserteblas en homajn societojn: abrupta aliĝo de inaj vivkondiĉoj neeblas.

Por manifestiĝi, la dia amo enkarniĝas pere de sanga kaj karna patrineco; cetera virino apudeblas Kriston piede de la kruco. Sed tia ina plivalorigo ne povas efektiviĝi ne kontraŭstarante enradikiĝintajn antaŭjuĝojn. Inter la apostolaro virinoj malĉeestis. En la unuaj palestinanaj komunumoj oni malpermesas inan oficon iaspecan; tamen baldaŭ evidentiĝas, ke virina apostola agado nepre necesas. Dom-mastrinoj ofte kaŝaranĝas siadome kristanajn kunvenojn; de tiuj akceptantinoj oni post mallonge postulos sangateston kaj sangoferon. Dume sankta Paŭlo, ekslernanto en rabena farisea skolo, rememorigas virinojn pri ilia duaranga situacio kaj disvolvas tri ĉefajn temojn mezepoke pritraktotajn: -viro estas peranto inter Dio kaj virino; virino estas duaranga estaĵo por viro naskita; virino kulpis la prapekon. Por forskui la polvon de la malnova hebrea heredaĵo necesis alispecaj kulturaj enporto; ili fontis el la grekaj kaj orientaj eklezioj.

Pri vidvinoj kaj diakoninoj - De la komunumo subtenataj, kiam ili ne povis sin vivteni memstare, vidvinoj estis devigataj repaĝe sin dediĉi al preĝado; ili fariĝis

kvazaŭ diaj altaroj. Bonfartaj sesdek jarulinoj unuedzaj estis komisiitaj instrui virinojn pri religio, viziti la malsanulojn kaj malriĉulojn. Ili rajtis surmeti la manojn, sanktolei. La ora epoko de vidvina agado estas la tria jarcento postkrista.

En Romio la diakoninoj (origine edzinoj) apartenis al tute malsupera rango. En Grekio kaj Mezoriento, same, kiel viroj agadis ĉe viroj, virinoj agadis ĉe virinoj. Ili konsistis el iaspecaj gastigantinoj ĉe kunveneja pordo; pli kaj pli ili transprenis la aktivaĵojn antaŭe plenumitajn de la vidvinoj; ĉi-lastaj siavice fariĝis preĝantinoj, eĉ preĝistinoj. La diakoninoj helpis la pastraron por disdoni la sakramentojn ĉe inoj kaj infanoj. Tiu eklezia ofico estis sankciita de kvazaŭ konsekrado. Notinda estas la sinteno de la koncilio en Orange kunveninta dum la jaro 441-a: disvastiĝanta kristanaro postulas bonfaradan strukturigon, kiun de nun viroj prenas sur sin.

Abatino, solvirino, geedzeca taksado - Depost la XIII-a jarcento en orientaj eklezioj oni ne plu ordinaris diakoninojn. En okcidento ekde la unuaj jarcentoj, laŭ regularo de sankta Cezaire prilaborita, fondiĝas kaj disvolviĝas la unuaj pramonahinejoj: silentado, preĝado en difinitaj horoj tagaj kaj noktaj, silenta legado (jen tute nova kutimo), sed jam ne vera enklostriĝado; malsanula prizorgado; ambaŭseksa infaninstruado, (komence pere de forkanto el kies tekstoj la lernantoj iom post iom eltiris la literojn, vortojn kaj legokapablon; jen praa eltutaĵa legmetodo).

Virgecon oni pli kaj pli alte taksas, ankaŭ pro revigliĝo de platonisma filozofio, apero de gnostikismo kaj ties malŝato al amorado. Kutime kultan rolon inoj ne prenis sur sin, krom kelkaj abatinoj, kiuj arogis al si ampleks-egajn povojn; foje ili regis super

ĝemeligitaj abatejoj, eĉ konfesprenis kaj lokis sin sur la saman ŝtupon, kiel la ekleziaj potenculoj. Estiĝas emo rangaltigi solvirinon, kies digno ne fontas el vira helpo kaj protektado.

Signifoplena estas la evolulinio koncerne la kontraŭadultan reglamentadon: en la komenco adulta edzino meritas mortpunon kaj ŝia edzo rajtas agi laŭplaĉe; poste la ideo pri mortpuno malaperas. La kulpintino ĝismorte pluvis en monaĥinejo, sed ŝia edzo povas ŝin ree akcepti dum la unuaj du jaroj postkulpaj. Cetere unufoje vira adulto estas sankciita per monpuno.

Dum la franka epoko, retropaŝo-

Estas ja konate, ke virino fariĝas konstanta viktimo en konfuzitaj periodoj, kiam regas agitado kaj perfortoj. Ekzemple, Karlo la Granda kavis kvin edzinojn kaj multajn kromedzinojn. Oni destinis junajn knabinojn por la reĝa lito. En manlaborejoj, kie ŝpinis kaj teksis junulinoj, la nobeloj venis elekti sian "ĉasaĵon". Ne nur fakte sed ankaŭ jure oni retroiras: triabaj strukturoj de la novalvenintoj enkondukas patriarkecon drastan, kompareblan kun tiu elpensita de la Romianoj. Poste la envenintoj estas influataj de kristanismo kaj de latinaj kutimoj. El tio rezultas, ke virino estas dumviva neplenaĝulino, kiu transiras de la patra al la edza aŭtoritato; la patro transdonas sian povon al la bofilo pere de monsumo tiel, ke ino estas ne kontraktantino sed kontraktobjekto.

Neeblas ĉi-kadre detale pristudi la konfuzitan periodon inter la V-a kaj la X-a jarcentoj. Kiel en ĉiuj historiaj kaj homaj fenomenoj notinda estas evolulinio nerekta, sed zigzaga. Resume oni observas iom-post-ioman plilarĝiĝon de la ina statuto: ebleco edziniĝi propravole, ebleco ricevi propramane la ĉi-koncernan sumon, kiun antaŭe la estonta edzo enmanigis al la patro, ebleco zorgi pri sia persona havaĵo, ebleco fariĝi heredantino. Cetere virinoj estis pli tralasivaj ol viroj al kristanisma influo. En Francio, Germanio, Italio, Hispanio, Finnlando, famaj abatinoj, samrange kiel episkopoj,

grafoj aŭ reĝaj vasaloj partoprenis en lokaj kunsidoj pere de siaj rajtigitoj, kiuj diskonigis la volon de siaj sendintinoj. Tamen en la jaro 585-a, laŭlegende, okaze de konsilio en la urbo Mâcon, iu malklera episkopo starigis jenan demandon: "Ĉu la termino "homo" taŭgas ankaŭ por virinoj?".

Deka kaj dekunua jarcentoj- La ununura firmeco konsistas el ligo inter vasalo kaj feŭdomastro. La feŭdosistemo starigas du kompletigantajn organizojn: militistan defendsocion kaj aliflanke proviantan kamparsocion. Konsekvence de tio du inaj vivsortoj siluetiĝas: ĉu edzino grandsinjora, ĉu edzino kamplaborista. Same kiel sub la Merovida -dinastio la tasko daŭre konsistas el terkultivado kaj truddeviga ŝtofliverado al la nobeloj: nur laŭkvante varias la ŝpinota kaj teksota tolmezuro. Al servutulino trudiĝas duobla laboro (servutulo estas herede submetata al sia feŭdomastro. Eĉ kiam gefiloj estis naskitaj de gepatroj, kies feŭdomastro ne estis la sama, oni dividis la servutulan naskitaron).

En fermita universo vivas edzino nobela: meze de sia servistinaro ŝi ŝpinadas, brodadas, kudradas; en okazo de bezono flegas la vunditojn. Ŝi estas nur nepreciza figuro meze de societo vira; nur preterkure profiliĝas fianĉinoj aŭ edzinoj en ĝesto; nur heroinoj ili aspektas, kiuj reblovas la fajron de kuraĝo aŭ trapikas la gorĝon kaj duonigas la kranion de sovaĝa atakanto. Sed kavaliroj nur malestimas erotikajojn. Tamen pro longa forestado de la edzo forveturinta al krucmilito, ŝi akiras, paŝon post paŝo, pligrandigantan lokon, kaj sur fakta kampo, kaj sur jura kampo; ŝi devige regas super la bieno; eĉ kelkaj estis memposedantinoj de feŭdbienoj; tia estis ekzemple Alienor de Akvitanio eksedzino de Ludoviko la VII-a. Tamen en la jaro 1316-a post la morto de Ludoviko la X-a oni rifuzis surtronigi virinon pro tio, ke reĝiniĝo implicus konsekradon, t.e. speco de ordinado. Ofte okazis, ke nobelulino fariĝis poredziĝa kalkulobjekto cele al transdono

aŭ transpreno de feŭdobiĝo. Por malhelpi tiajn troigojn, la filo de Vilhelmo la Konkerinto sin devigis ne perforte edzinigi orfinojn aŭ vidvinojn.

En kampandometoj kaj kastellaborejoj inoj teksadas kaj ŝpinadas laŭritme de siaj kantoj; ili estas verkoj de kaj por ŝpinistinoj. Ili konsistas el sennomaj popolkantoj, en kiuj oni prikantas amon, fidelecon, forlason, esperojn. Inoj gardas civilizacion per poezio, sopiro al amo vera, al valoroj esencaj.

Dua feŭdepoko- 12a kaj 13a jarcentoj-

La eklezio mildigas la morojn kaj provas malrapidigi la militan sinsekvon kaj la internobelajn luktojn; tiucele ĝi komisas la kavaliraron protekti vidvinojn kaj orfojn; paca erao komenciĝas. Krucmilitoj maloftiĝas. El Oriento oni enlasas emon al festoj, lukso, pompo. Laŭ galanta ammaniero kavaliro enpaŝas la batalejon nur por plaĉi al sia damo. La ĉefa afero fariĝas konkerti daman koron, amsopiri je la piedoj de belulino. La vorto "omaĝo", t.e. subiĝo de viro al viro, aliĝas al subiĝo de viro al virino. Feŭdeco enscenigas literaturan fikcion: kavaliro, ĉu grand-sinjoro, ĉu humila trobadoro estas servisto de sia damo. Kruda, nedaŭra amo cedas lokon al korbatiĝa sento. Ina korpo estas perceptata, kiel videbla juvelujo entenanta nevideblajn valoraĵojn. Spiritaj vojoj trairas la ĝojon ami. Ina povo jam ne konsistas el estigo de deziro sed el stimulo de plej noblaj animfortoj; vera amanto kapablas plenumi ĉiaspecajn provaĵojn kaj el propra doloro li ĉerpas superan ĝuadon.

Oni tre malofte elparolas la nomon de la mistera elektitino; ofte temas pri aŭtentaj belkorpaj vivulinoj, foje jam edziniĝintaj; sed malproksima amo sufiĉas por nutrofortigi la poetan sentimenton. Ofte trobadoroj amas platonece; tia estis Catelan, kiu sekvis Parizen Margeritan el Provenco, kiam ŝi edziniĝis je Ludoviko la 9-a. Oni murdis lin en Bulonja arbareto kaj la murda loko alprenis lian nomon.

En amliteraturo enŝteliĝas

distingo inter amo kaj geedzeco. La romano pri Tristan kaj Yseut estas eŭropa mito pri adulta pravigo. La erare englutita amtrinkaĵo prezentas simblon ekskuzon por amo liberiĝinta el geedzeca ligo. Ĉe Marie de Champagne oni starigis jenan demandon: "Ĉu vera amo povas estiĝi inter geedzoj?". Nee respondis Maria. En Sudfrancio notindas la kutimo, ke ofte geamantoj travivas la unuan nokton kune neamante. Verdire sinteno tia plejparte fontis el truditaj geedziĝoj. Sed ĉu platona, ĉu adulta, la amo al la elektitino postulas fidelecon kaj ekskluzivas vulgarecon. Amkodo estas starigita, kiu definitive stampas nian okcidentan civilizacion. Ina kulto: jen la transcenda vojo al la spirita aventuro. Ina kulto enpenetras kristanan piemon al Nia Sinjorino, al kiu oni dediĉas multnombrajn katedralojn. Ni aldonu signifoplenan detalon: en ŝakludo la damo anstataŭas la ministron, kiel reĝan adjunkton; kaj poste la damo fariĝas reĝino.

Por pli bone klarigi la "amdemandon" tiustilan, ni aldonu du rimarkojn: unue amkortumoj ĉe inoj respondis virajn kortumojn, kie vasaloj omaĝis al feŭdomastro kaj kie oni eldiris juĝojn. Amanto estis de la damo juĝata kaj omaĝis al ŝi. Due: dum la katarisma epoko, kiam trobadoroj plej brile prosperadis, iliaj kantoj ofte akceptis du signifojn: la unua povis esti de la plimulto komprenata, dum la dua, simbola, esotera, liveris kaŝitan mesaĝon pere de religiaj kaj poeziaj ŝlosiloj al la adeptoj devigataj sin kaŝi pro la romkatolika inkvizicio. Ekzemple, la ofte uzata antaŭnomo Johanino prezentas la katarisman eklezion, kies plej alte taksata protektanto estis sankta Johano; kaj kaŝlokoj, kie pluvis adeptaj fratoj estis subkomprenigataj pere de simbolaj kreskaĵoj aŭ ŝtonoj, kiel indikiloj.

S. BONIOL

(daŭrigota)

NESSIE - MONSTRA

MISTIFIKO

Bernard GOLDEN

Nessie revenas— Antaŭ kelkaj jaroj aperis en "Monato" raportaĵo pri ankoraŭ unu provo trovi la monstron de Loch Ness. La raportinto nomis la t.n. sekreton de la skota lago "unu el la plej konataj modernaj mitoj en Britio". Oni devas pli precize karakterizi la aferon kiel unu el la plej hontindaj kaj enormaj mistifikoj de la 20-a jarcento. Ĉiuj ĝisnunaj provoj spuri la misteran akvobeston senescepte fiaskis; tamen senĉese aperas sur la bordo de la lago novaj fantaziuloj, kiuj altiras la atenton de la gazetaro per sensaciaj kaj senrespondecaj eldiroj pri siaj esploroj. Estas evidente, ke tiaj homoj, ne komprenante, ke estas sencece disipi monon, fortostreĉon kaj tempon por ripeti jam plurfoje malsukcesajn eksperimentojn, obstine komencas de punkto nulo kaj daŭrigas sian kimeran agadon ĝis iliaj financaj rimedoj elĉerpiĝas, la gazetaro perdas interesiĝon kaj la publiko enuas. Sed neeviteble, post iom da tempo novaj vizaĝoj speguliĝas sur la akvo de la nordskotlanda lago, kaj la procezo ripetiĝas. Kiu volas vidi sian nomon en la sekvant-taga gazeto, devas nur anonci, ke li ĵus ekvidis "Nessie", kiel oni jam karesnome baptis la imagitan bestegon. Ni ekzamenu unue gravan aspekton de la fenomeno de Loch Ness, la distrumpetitajn sciencajn esplorojn.

Objektiva registrado de donitaĵoj—

Ĉar skeptikuloj rifuzis kredi perbuŝajn raportojn de homoj, kiuj asertis, ke ili vidis grandan beston en Loch Ness, provoj estis faritaj ekde la nuntempa periodo de observado en la 1930-aj jaroj por objekte registri donitaĵojn pri la monstro. Plej ofte temis pri fotografado de objekto aŭ estaĵo, kiu aperis sur la surfaco de la akvo kaj subite malaperis. Ĉar tiaj okazaĵoj ne

estas atendeblaj, la simplaj skatol-kaj plakaĵfotiloj en la manoj de entuziasmaj laikoj ne donis konvinkajn rezultojn. Turniropunkto markanta la finon de la diletanta periodo de esplorado okazis en la 1950-aj jaroj, kiam komenciĝis sporadaj provoj fare de subakvistoj spuri la monstron per televidaj kameraoj kaj eĥosondiloj. Nur en la 1960-aj jaroj estis entreprenita grandskala science orientita reserĉo per teknike perfektigitaj instrumentoj funkciigitaj de diversbrancaj universitataj fakuloj kaj profesiuloj. Fotografistoj, filmadistoj, sonar-inĝenieroj kaj subakvistoj venis al Loch Ness, armitaj per teleobjektivaj fotoaparatoj, kino- kaj televidkameraoj konstruitaj por subakva filmado, sonar-aparatoj, hidrofonoj kaj ankaŭ subakvaj ŝipetoj.

Laŭ la artikoleto en "Monato" citita ĉi-supre, novebakita membro de la "monstro-fratularo", kiel unu el la aŭtoroj nomas la fanatikulojn, kiuj dediĉas sin al observado ĉe Loch Ness, estas Adrian Shine. Li jam utiligis eĥosondilojn kaj venontjare planas esplori la lagon per telegvidata submarŝipeto kaj subakvaj kameraoj. Oni emas demandi, kie estis s-ro Shine dum la pasinta kvaronjarcento, kiam plurfoje estis uzitaj ĝuste tiaj aparatoj kaj ekipaĵo, kiuj liveris centprocente negativajn rezultojn.

Organizita esplorado de la fenomenoj—En 1962 estis establita la Buroo por Esplorado de la Fenomenoj de Loch Ness; kiu primare estis kolekto-ejo de informoj kaj nur sekundare aktiva esplor-organizaĵo. La Buroo havis daŭran sidejon ĉe la lago kaj en diversaj lokoj starigis fotad-staciojn kun fotografiloj kaj kameraoj, ĉiuj ekipitaj per potencaj teleobjektivoj. Cetere, aro da kamionetoj servis, kiel moviĝantaj fotad-stacioj. Provoj estis faritaj altiri "Nessie" al la surfaco. Dumnokte armeaj lumjetiloj kun trafdistanco de 10km. prilumis la lagon, kaj samtempe funkciis infraruĝaj fotiloj. La Buroo plenumis eleraajn esplorojn

super la lago, unue per yarmaeraj balonoj kaj, en 1970, per aŭtogiro. Okazis ankaŭ pli oftaj subakvaj esploroj per ŝipetoj. Unu el la celoj estis pafi al la monstro per biopsia sageto por akiri malgrandan fragmenton de ĝia haŭto. La publika interesiĝo pri la monstro de Loch Ness atingis sian apogeon en 1969, sed ankaŭ en la sekva jardeko entuziasmo ardis.

Usonaj dolaroj anstataŭis britajn pundojn - Post dek jaroj da nefrukto-dona laboro, la Buroo por Esplorado de Loch Ness devis ĉesigi sian agadon pro manko de financa apogo. Tiam okupis la vakan lokon ĉe la lago usonaj esploristoj alportantaj pli da mono, pli da teknika ekipaĵo, kaj pli da novaj metodoj. La gvidanto de la nova kampanjo estis d-ro Robert Rines (la nomo preskaŭ rimigas kun Shine!), la prezidanto de privata organizaĵo portanta la nomon Akademio de Aplika Scienco. Inter 1971 kaj 1976 Rines kaj Martin Klein, specialisto pri sonaro, provis lokalizi kaj fotografi la monstرون per aro da optikaj kaj elektronikaj instrumentoj. Ili uzis stroboskopan kameraon, kiu estis tiel sinkronigita, ke je ĉiu ekbrilo de la lampo, unu film-kadro estis eksponita. Kuplita al la kamerao estis altfrekvenca flank-skananta sonar-aparato, tiel sentiva, ke ĝi povis elasi la obturilon je plej leĝera movo.

Tamen, la fotografaĵoj, kiujn Rines faris, estis tre grajnecaj kaj ne montris klare identigeblajn formojn, eĉ post komputera prilaborado. Kvankam Rines interpretis objekton en unu el la fotoj, kiel "versajne palmopedo", fakuloj ne povis esprimi unuecan opinion pri ĝi. Alia foto farita en 1975 kreis sensacion, ĉar ĝi supozeble montris la unuaplanan vidaĵon de la kapo de la monstro kun du kornosimilaj elstar-aĵoj kaj malfermita buŝo kun grandaj dentoj. Skeptikuloj diris, ke tiu "monstro" povas esti la naturgranda modelo de vitrofibraĵo, kiu surfundiĝis en golfeto Urquhart dum filmado de "La privata vivo de Sherlock Holmes".

Rines kaj liaj helpantoj provis ankaŭ altiri la monstرون al la kamerao-stacio per diversaj rimedoj. Altfrekvencaj sonoj simulantaj afliktitajn fiŝojn (uzataj por altiri ŝarkojn) estis dissenditaj en la golfeton, kaj funkciis stroboskopaj kaj konstante brilantaj lampoj. Ujoj kun sango kaj fiŝodoro estis faligitaj en la lagon de la filmad-stacio al diversaj lokoj, por ke estiĝu odorvojoj. Balono trenis lineon provizitan per tranĉaĵo da lardo, pluraj specoj de mortintaj fiŝoj estis ĵetitaj en la lagon, kaj estis uzata ankaŭ logaĵo konsistanta el miksaĵo de bestaj hormonoj. Oni provis altiri Nessie ankaŭ per sonoj de bekfluto. Ankoraŭfoje Rines rikoltis fiaskon, ĉar la monstro ne reagis al iu ajn el la menciitaj stimuloj. (Daŭrigota)

KARAJ LEGANTOJ

Rusaj kaj polaj geknaboj atendas de ni respondon al ilia peto ĉeesti la Printempan Internacian Infanrenkonton. Multe kostas la vojaĝo. Helpu nin doni al ili jesan respondon. Sendu vian financon helpon, eĉ malgrandan, al: Maison Culturelle esperantiste, poŝtkonto: Nantes 1485 39 P. Aldonu la indikon: "Por la Infan-renkonto". Dankon.



Mi pagis mian abondon.
Ĝusta tempo.
Kaj vi?

el P. Babín, poŝtkonto Nantes 281361L
aŭ el via peranto: vidu liston sur la
lasta kovrilpaĝo

Memoru, ke la nova abontarifo estas, ekde la komenco de 1994, 80,00 fr. Niaj eksterlandaj abonantoj bonvolu konsulti nian rubrikon: "Nia Perantoj" sur la lasta paĝo de la kovrilo.



KULTURAJ KAJEROJ

deziras al ĉiuj siaj amikoj feliĉajn tagojn dum la venonta jaro.

PRI KRISTNASKO

Antaŭ longe la kristnaska ŝtupo estis vera ŝtupo, kiu devis bruli de la 24-a de decembro meznokte ĝis la 1-a de januaro matene. La cindro estis parte konservita en blanka tuko por certigi feliĉon en la domo. La alian parton oni metis sur la tegmenton por forpeli la gesorĉistojn. En Provenco, la familia plejaĝulo ŝprucigis vinon sur la ŝtipon, kaj diris: "Ĝis la venonta jaro! Espereble se ni ne estos pli ĉirkaŭ la tablo, ni ne estos malpli." Ĉiu membro de la familio kunportis hejmen ŝtupo-pecon bruligotan.

Nun ĉiu membro de la familio ricevas pecon de la ŝtupo sed en sian teleron ĉar ĝi fariĝis kremkuko.

De kie venis la Tri Magoj, kiuj, laŭ la Matea Evangelio venis adori la ĵus-naskitan Jesuo-n? Ĉu ili vere estis reĝoj? Restas neklaraj punktoj pri tio ĉar nur Mateo parolas pri Magoj de oriente venintaj, kiuj malfermis siajn kestetojn kaj ofertis al la ĵusnaskito "oraĵojn, incenson kaj mirhon". Nur poste la legendo baptis ilin Gaspardo, Melkioro kaj Baltazaro kaj nomis ilin "reĝoj", kiuj prezentas la tri aĝojn de la vivo kaj diversajn rasojn.

Sed neniu povas aserti, ke ili estis nur tri. La ortodoksa legendo parolas pri kvara mago, rusdevena, kiu ankaŭ ekiris kun multaj donacoj.

Ĉar la vojo estis por li pli longa ol por la aliaj, malrapide iranta pro disdonado de almozoj survoje, li estus alveninta tro malfrue en Betlehem. Stranga legendo pri tiu saĝulo venanta de la Nordo per sia glitveturilo kaj disdonanta donacetojn? Ĉu li ne similas la Kristnasko-patron, kiu aperas en la sonĝoj de la etuloj? Ĉu la heredinto ne vivas, korpe apud la Poluso?

Survoje al la Polusa Cirklo la turistoj povas, en Finnlando, viziti la vilaĝon de la Kristnasko-patro dum la tuta jaro. Tiu Kristnasko-patro estas pagita de la registaro. Li promenas tie kun blanka barbo en la vento, varme vestita per ruĝa surtuto bordita je blanka pelt, same kiel tiuj kiujn oni renkontas ĉe la pordoj de grandaj vendejoj en decembro pli sude.

En pluraj regionoj de Francio, sur la festo-tablo de la Kristnasko-tageto, estas metitaj teleroj plenaj je figoj kovritaj per blanka faruno, sekaj vinberoj, migdaloj kaj aveloj. Tiujn kvar sekajn fruktojn oni nomas "almozuloj". Kial? Verŝajne pro la koloroj, kiuj rememorigas tiujn de la roboj de la almoz-monaĥoj.

*

* *

MODERNA FABELO

Ĉu estis, ĉu ne estis, eble trans la Fabelmaro, estis eta birdo. Tiu ĉi eta birdo foje tre, tre enuis kaj alflugis arbeteĉon: "Kara arbeto, lulu min!" - "Unue, mi estas Arbeto Moŝto; due mi nun ne havas oficialajn horojn por akcepti petskribojn" diris la arbeteĉo, "mi tute ne havas emon luli vin, malinda birdeto!" La eta birdo ege malgajigis, foriris. Ĝi iris, iradis; fine ĝi renkontis kapron. "Kapro, maĉu la arbeteĉon!" Sed la kapro ne volis maĉi arbeteĉon; sekve la arbeteĉo ne lulis la etan birdon. Denove iris, iradis la eta birdo. Ĝi renkontis lupon. "Lupo, manĝu la kapron!" - "Pardonon, mia kara," diris la lupo, "ne estu tiel diktatora! Eble vin mi volonte formanĝus se vi ne estus tiel malgranda. Mi proponas al vi, bonvolu foriri." La lupo ne volis manĝi kapron, la kapro ne volis maĉi la arbeteĉon, sekve la arbeteĉo ne lulis la etan birdon. Denove iris, iradis la eta malgaja birdo. Foje ĝi renkontis aŭtomobilon. Ĝentile ĝi alparolis ĝin. "Kara, bonodora Benzinaparato, ektimigu la lupon!" La aŭtomobilo havis alian direkton. Ĝi ne volis ektimigi la lupon, la lupo ne volis manĝi kapron, la kapro ne volis maĉi arbeteĉon; sekve la arbeteĉo ne lulis la etan birdon.

La eta birdo estis tute melankolia. Ĝi iris, iradis, kaj fine renkontis fajron. "Fajro, forbruligu la aŭtomobilon!" - "Ĉu vi rigardas min freneza? Ĝi estas asekurita. Vane mi ne laboras." La fajro ne volis forbruligi la aŭtomobilon, la aŭtomobilo ne volis ektimigi la lupon, la lupo ne volis manĝi la kapron, la kapro ne volis maĉi la arbeteĉon; sekve la arbeteĉo ne lulis la etan birdon. Iris, iradis nigre la eta birdo; foje ĝi renkontis akvon. "Akvo, mi petas vin, estingu la fajron!" - "Mi ne havas tempon, mia kara," diris milde la akvo, "hodiaŭ mi estas tre okupita. Mi devas ĉeesti kontraŭakoholan kunsidon. Eble morgaŭ! Ĝis revido, mia kara!" La akvo ne volis estingi la fajron,

la fajro ne volis forbruligi la aŭtomobilon, la aŭtomobilo ne ektimigi la lupon, la lupo ne volis manĝi la kapron, la kapro ne volis maĉi la arbeteĉon; sekve la arbeteĉo ne lulis la etan birdon.

Iris, iradis larme la eta birdo. Foje ĝi renkontis bankdirektoron. "Tre estimata sinjoro Bankdirektoro! Patro de l'malriĉuloj! Trinku la akvon!" - "Akvon? Tute ne! Mi estas ege okupita! Nun mi organizas la fajfiltruo-eksporton al Hotentotujo. Cetere mi neniam trinkas akvon, nur ĉampanon. Ĉu vi ne havas alian negocon? Do ĝis revido, mia kara amiko! Ĝis revido!" La bankdirektoro ne volis trinki akvon, la akvo ne volis estingi fajron, la fajro ne volis forbruligi la aŭtomobilon, la aŭtomobilo ne volis ektimigi la lupon, la lupo ne volis manĝi la kapron, la kapro ne volis maĉi la arbeteĉon; sekve la arbeteĉo ne lulis la etan birdon.

Iris, iradis, plore, la eta birdo. Fine ĝi renkontis tre belan, modernan, simpatian, maldikan, gracian sinjorinon. "Belega Sinjorino! Mi petas vin; kisu la bankdirektoron!" - "Ĉu li estas bela?" "Ne, li estas malbela." "Ĉu li estas juna?" "Ne, li estas maljuna." "Ĉu li havas longajn harojn?" "Ne li tute ne havas harojn." "Ĉu li estas riĉa?" "Jes, jes, li estas riĉega!" "Riĉa? Do, bone, mi kisos lin."

Kuris la eleganta sinjorino, kisis la bankdirektoron; kuris la bankdirektoro, trinkis la akvon; kuris la akvo, estingis la fajron; kuris la fajro, ekbruligis la aŭtomobilon; kuris la aŭtomobilo, ektimigis la lupon; kuris la lupo, manĝis la kapron; kuris la kapro, maĉis la arbeteĉon. La arbeteĉo ja lulis la etan birdon.

Se la bankdirektoro ne estus havinta multe da mono, ankoraŭ pli longe daŭrus mia fabelo.

Francisko Szilágyi


POR VIA DISTRO

La ŝlosilvortoj estis:

Verda stelo - Kuraĝo - Amsterdam - serpento
Rinocero - Fortepiano - Paganini - Ripeti
Pipro.

Albert Einstein diris: "Paco ne povas esti atingata per la perforto sed nur per interkompreniĝo."

NOVA ENIGMO



Horizontale: 1-rilata al iu monato - 2-ŝirmilo; prepozicio - 3-katbleki; simpatia inklino al iu - 4-stangoj fiksitaj laŭlonge de ŝtuparoj por sin apogi - 5-kredema homo - 6-ankaŭ ne; en tia pozicio oni estas sur seĝo - 7-Nombro, kiu entenas alian nombron en ĝusta kvanto; neoportuna, malagrabla - 8-senpeze; interjekcio esprimanta bedaŭron - 9-regulo difinanta la kondiĉojn, tiel ke tiuj objektoj estu interŝangeblaj - 10-formas karesan derivaĵon; oriento.

Vertikale: 1- estigas malfacilaĵojn sur la ŝoseo (rad.)- 2-aro da iloj, da maŝinoj (rad.)- sufikso - 3-fratino de la avo aŭ de la avino - 4-Tia, ke ĝi estas bona por io - la plej maleebla el ĉiuj metaloj - 5-iris anteneno; en alta grado - 6- nomo de litero, kemia simbolo; penanta ne esti trafita de malfacilaĵoj - 7-Duondire; finaĵo de la estonteco - 8-majonezo kun mustardo kaj aromherboj - 9-bronzo aŭ latuno ekzemple; altigas la guston de la ŝafrostaĵo.

LA VIVO EN GRESILLON

KOMITATKUNVENO - DIMANĈON LA 17an DE OKTOBRO 1993

Ĉeestis la kunvenon: D. kaj P. Babin, F. kaj H. Boyet, B. Cheverry, Ph. Combet, G. Dairon, D. Gourdon, G. Lagrange, P. Métivier, P. Naulet, J. Vincent. La aliaj komitatanoj senkulpiĝis.

Staĝoj 1992- La infanrenkonto estis plensukcesa. Kelkaj aliĝoj estis rifuzitaj pro manko de loko. Somere la nombro da partoprenantoj iom malkreskis kompare kun la rezultoj de la antaŭa jaro.

Periodo	Nombro da ĉeestantoj	Nombro da tranoktadoj
1-a	82	471
2-a	43	422
3-a	42	365
4-a	54	499
5-a	55	458
6-a	23	320

Kiel kutime apenaŭ la duono de la ĉeestantoj restadis dum kompletaj stud-periodoj. La situacio estas ĝena por la kursgvidantoj, kiam kursanoj "envagoniĝas survoje". Kursoj kaj prelegoj estis ĉeestataj kiel kutime. La enspezoj kaj elspezoj malkreskis proporcie al la malkresko de la nombro da ĉeestantoj.

Staĝoj 1994- La printempa infan-renkonto okazos de la 23-a de aprilo ĝis la 1-a de majo. Jam aliĝpetoj alvenis. La partopreno de infangrupoj el Rusio kaj Pollando dependos de la financa helpo-povo de la Kultur-Domo. Novaj alvokoj estus faritaj favore al la speciala Fonduso.

SAT-Amikaro deziras okazigi sian kongreson en 1994 en Gresillon, de la 1-a ĝis la 4-a de aprilo. D. Babin kaj P. Naulet reprezentos la esperanto-Domon en la organiza Kongresa Komitato.

Programo 1994

- 23/04 - 01/05: Internacia Renkonto de Infanoj.
- 22/06 - 09/07: Internacia Amika Renkonto. Kursoj;
- 10/07 - 23/07: Kursoj (Tri niveloj)- Rekta metodo.
- 24/07 - 06/08: Lernu, praktiku kaj perfektigu: kursoj kaj, unua semajno: gramatiko; dua semajno: tradukado.
- 07/08 - 20/08: Kursoj (Tro niveloj); rekta metodo;
- 21/08 - 3/09: kursoj kaj pedagogia helpo por kursgvidantoj.

Prizorgaj laboroj- La renovigado de la apudkuireja lavejo estis tre efika. La ĉambro bele aspektas. La necesa renovigo de la trabaro super la granda salono elspezigos grandan sumon. Verŝajne helpos la repago de parto de TVA pagita por 1991, ĉar intertempe la leĝo pliprecizigis!

La sekretario: Guy DAIRON

FONDUSO INFANRENKONTO: Sendu viajn ĉekojn al: Maison Culturelle Esperantiste
Gresillon, 49150- BAUGE. Poŝtkonto: Nantes 1485 39 P

LIBRO-SERVAJ NOVAĴOJ

Lernolibroj: "Ni parolas esperante" (V. Nemec) - 84 fr.

"Vojaĝo en Esp^o-lando" (B. Kolker) Perfektiga kurso ilustrita kun tekstoj de klasikuloj pri la lingvo, movado, literaturo, fragmentoj el Esp^o-beletraĵoj, komentoj, ekzercoj - 105 fr.

Lingvaj studoj: "9 prelegoj pri la fundamento" (Dr Albault) - 90 fr.

Petu la katalogon de: S-ino J. Vincent, 26bis, rue de Milngavie
49150 - BAUGE

OFERTO PRI AŬKCIO

Bonvolu sendi viajn prezproponojn en la limo de unu monato post la ricevo de ĉi tiu oferto al S-ino J. Vincent, 26bis, rue de Milngavie 49150 - BAUGE.

N = kvazaŭ nova

U = uzita

TITOLO	BAZA PREZO	STATO
La dolĉa Franclando (Delaire) 1972	30 fr.	N
Essence et avenir de l'idée d'une L.I. (UNUEL) Hachette 1907	20 fr.	U
E ^o , fil d'Ariane (Delaire) dulingva, 1959	30 fr.	N
" kun subskribo de la aŭtoro	40 fr.	N
Eta plumba soldato, Esp. Francaj Eldonoj	10 fr.	N
Fundamenta Krestomatio, Esp. Centra Librejo 1933	30 fr.	U
Fundamento de Esperanto " 1931	20 fr.	N
Ifigenio en Taŭrido (Goethe) " 1929	20 fr.	U
La interrompita kanto (Orzeszko) " 1928	20 fr.	N
Kampomuso ekskursas, Esp. Francaj Eldonoj	10 fr.	N
Kongresinsigno UK Paris (metala) - 1914	20 fr.	N
Kun niaj amikoj, la bestoj - Esp. Francaj Eldonoj	10 fr.	N
Leteroj de Zamenhof (2 vol.)- SAT 1948	50 fr.	U
Lingvaj Respondoj - Esp. Centra Librejo - 1927	25 fr.	U
Marta (Orzeszko) bindita - Hachette - 1910	50 fr.	U
Orharulo kaj ruĝa kresto - Esp. Francaj Eldonoj	10 fr.	N
Originala Verkaro - Eld. Hirt kaj Sohn 1929	40 fr.	U
Peer Gybt (Ibsen) - Eld Rondo Trondheim - 1951	50 fr.	N
Plena Vortaro 3-a eldono 1947	50 fr.	U
La ratkaptisto el Hameleno - Esp. Francaj Eldonoj	10 fr.	N
La revizoro (Gogol) Esp. Centra Librejo - 1928	15 fr.	U
Suplemento al P.V. 1954	10 fr.	U

La libroj estos senditaj aŭ frankite.


La tuta profito de tiu aŭkcio iros al la fonduso por la Infana Renkonto.

GRAMATIKO PER BONHUMORO

« Se la adverbo devenas de verbo transira (kiu postulas akuzativon), tiam ankaŭ la adverbo-prepozicio konservas tiun saman econ kaj estas uzata kun la akuzativo ; se la adverbo anstataŭas vorton, kiu povas ligiĝi kun substantivo nur per ia prepozicio, tiam ankaŭ la adverbo akceptas post si tiun prepozicion ; se la adverbo estas vorto ne devena, sed originala, kiu per si mem havas la sencon de prepozicio, tiam ĝi ligiĝas kun la substantivo senpere.

Tamen en ĉiu duba okazo vi ne faros eraron, se vi post adverbo-prepozicio uzos la prepozicion « je » aŭ la akuzativon.

(L.L. Zamenhof — « Lingvaj Respondoj »)



— Kaŭze de tiu televido, la rostbovaĵo estos tro kuirita.



— Rilate vian am-deklaron, ĉu vi estas certa pri viaj sentoj, Joĉjo ?

— Spite al kelkaj malfacilaĵoj mi sukcesis ĝin fari !

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).
- Belgio** : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).
- Britujo** : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter**, EX 4 6 JT (8 pundoj).
- Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).
- Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).
- Germanujo** : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).
- Hispanio** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10°-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).
- Italio** : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (20.000 liroj).
- Japanio** : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatjōziši TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).
- Nederlando** : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).
- Nov-Zelando** : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol.).
- Pollando** : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).
- Portugaliao** : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa (2.800 esk.).
- Svedujo** : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).
- Svislando** : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).
- Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).
- Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34